


TUTIMONDO

ESPERANTA

monata revuo amuza
kaj sciiga



Nro. 1 Karlsruhe, Januaro 1933.

1

TUTMONDO

ESPERANTA

Administracio: Friedrich Schloe, Tutmondo-Presejo kaj Eldonejo, Karlsruhe am Rhein (apud Rejno) Dammerstockstrasse Nr. 15 Germanlando

monata revuo amuzaj kaj sciigaj

Prezo de abono: (nur antaŭpage) kvaronjare 0.40 germ. markoj; 0.50 svis. frankoj aŭ 0.10 uson. dolaroj, sen sendkostoj. Poŝta ĉekkonto nro. 79524, respondkuponoj akceptataj. - Anoncoj: unucentimetra kolonero (72 mm. larĝa) l.— germana marko. Anoncetoj: 2 linioj 0.50 germ. markoj (72 mm. larĝa) ĉiu plua vorto aŭ mallongigo 0.05 germ. markoj, nur antaŭpage. Rabato; $2 \times 10\%$, $6 \times 20\%$, $12 \times 30\%$.

Numero 1

Karlsruhe

Januaro 1933

Alvoko.

„Nova gazeto en Esperantujo“. La Esperantisto ridetas kaj imagas: Jam sufiĉe da gazetoj estas haveblaj, pro kio ni bezonas novan? Haltu! kara Esperantisto kaj aŭskultu, kion ni diru vin.

Certe jam aperas sufiĉa kvanto da diversspecaj gazetoj esperantaj. Ni havas ekzemple gazetojn por disvastigi kaj anonci nian ideon, gazetojn lingvosciencajn, organizajn kaj alispecajn. Sed kio mankas al ni, estas revuo peresperanta, kiu amuzigas kaj instruas nin per facilegebla legaĵo interesa. Jen nun estas tiuspeca revuo! Antaŭ ĉio ni pensis ĉe la kreado de ĉi revuo al tiuj Geesperantistoj, kiuj estas ĉesigintaj komenckursojn kaj nun intencas uzi praktike nian lingvon. La sperta Esperantisto konsilos al komencintoj: legu kaj skribu! Por skribi ili povas serĉi korespondadon — sed kion ili legu? Ĉiuj gazetoj, organizaj aŭ anoncaj, ne bone taŭgas kiel legaĵo por komencintoj (ili ja ne estas kreitaj pro tio). Nia revuo plenigu ĉi tiun mankon! Sed ne nur pro tio estas kreita nia revuo, ankaŭ la sperta Esperantisto legu ĝin! Ne ĉiam oni estas inklinata prilabori kaj pripensi problemojn malfacilajn. De tempo al tempo oni volonte legas legaĵon facilan kaj amuzan. Kia estu nun la liverota legaĵo de „Tutmondo esperanta“? La formigo de la enhavo estas montrita laŭ nomo de nia revuo. El tuta mondo ni publikos literaturon, popularsciencan kaj anekdotan, distraĵojn, humoraĵojn, enigmojn k. t. p. Ankaŭ la okuloj estu ĝojigitaj per belaj ilustraĵoj. Do! ĉion ĉi, kion la homo bezonas por sin amuzi kaj distri, oni povas trovi en nia „Tutmondo esperanta“.

„Bone dirita“, imagos nun la Esperantisto, sed ankoraŭ ekzistas malhelpaĵo, kiu kontraŭstaras aboni la revuon: la elspezo! Certe kara Esperantisto! Ni ja scias bone, ke preskaŭ ĉiuj Esperantistoj devas precize kalkuli siajn elspezojn. Ĉefe tiuj, kiuj estas sensalajraj ne povas elspezi iom grandan sumon por tiuspecaj aĵoj. Sed pere de tre malalte fiksita prezo (nur 0,40 germ. markoj kvaronjare) ni ebligas, ke ĉiu Esperantisto povas mendi la revuon. Nun kara Esperantisto, estas forigitaj ĉiuj malhelpaĵoj, iru nun al poŝtoŝtanco kaj mendu „TUTMONDO ESPERANTA“, aŭ skribu poŝtkarton al ni, por ke ĝi estu liverota rekte de eldonejo. Sed faru ne nur tion, ankaŭ varbu plurajn abonantojn, ĉar ni tiam pligrandigos la amplekson de l' revuo. La devizo de l' eldonejo estas: ju pli multe da abonantoj des pli granda la amplekso! Via devizo estu: mendi kaj varbi!

Ĉe la sojlo de feliĉo.

Rakontite laŭ vera okazintaĵo de Bruno Goebel

„Mi fariĝos kuracisto por infanoj“. Al Tea Binder ĉi tio estis neŝanĝebla fakto. En kabano antaŭ urbo ŝi hazarde vidis malsanan infanon, kuŝante en amasloĝejo. Pro kompato konvulsiis ŝia koro kaj dum la nokto ŝi songis esti kuracistino helpante al la malfeliĉa infano. Ŝi neniam sentis tian feliĉon kiel nun. La gepatroj ne volis permesi al ŝi studi. Ili ja esperis: la filino baldaŭ perlaboras monon kaj subtenos ilin. Neniam monon posedis la gepatroj, por ebligi la studojn de sia filino. „Mi mem perlaboros la monon, kiun mi bezonas por la studoj!“ Per tiaj paroloj ŝi disigis la skrupulojn.

Fariĝis longa vojo peniga ekde decido ĝis realeco. La esperplena paŝo al malproksima celo ŝanĝiĝis al laciga paŝado. Kiel esperplene sonoris la titolo „studentino per propraj fortoj“. Nun ĝi fariĝis peza ŝarĝo sur ŝiaj junaj ŝultroj. Idealoj de memelektita profesio! Kie ili troviĝas? Neniam ŝi havis tempon por dormi. Nokte ŝi purigis vazaron en hoteloj. La mono ne sufiĉis satigi ŝin.

Tea Binder batalis por siaj idealoj dum kvar pristudaj duonjaroj. Tro multe ŝi devis labori ĉe fremdaj homoj. Ŝi devis vartadi fremdajn infanojn; doni krom-instruadon. Pro tio ŝi lacigis tiom, ke ŝi ekdormiĝis dum instruado en la kolegio. Tea Binder perdis la malesperan batalon. Ŝi dubis pri si mem. Nevenkeblaj malhelpaĵoj baris la celon. Nur malesperoj ĉie. La koro de la knabino rompitis pro troaj oferoj. Indiferenteco anstataŭis la iaman ĝojan kuraĝon. La kariero ne plu estas farebla, ĉar nenia ebleco ekzistas finigi la mankantajn kvar pristudajn duonjarojn. Kion fari? Tea Binder ne sciis respondi. Certe estis; kiel venkitino ŝi neniam revenos al la gepatroj. Ŝi ne volas konfesi la resignon de l' idealoj.

Ian alian ŝi devas komenci por vivi. Al sinmortigo mankis la kuraĝo.

Sencele ŝi vagis tra la pejzaĝo. Iuvespere ŝi frapis al pordo — unuafoje. Ŝi almospetis. Ŝi volis forkuri antaŭ ol la pordo malfermiĝis. Sed la piedoj estis mal-

fortaj. Ŝi devis halti, ĝis la pordo estis malfermata. Nova epoko komencis en ŝia vivo. Dum nokto ŝi dormis en fojnejo. Neniu larĵoj forigis la turmentojn. Ŝi volis helpi al la homaro per siaj tutaj scio kaj forto kaj nun ĉi tiu homaro devis donaci al ŝi sekan panon. Leviĝo el ĉi tiu abismo ne plu estas ebla. Sur strato ŝi movis sin seninterese, meĥanike. Tea Binder venis en grandan urbon. Azilo fariĝis ŝia tranoktejo. Ŝi vidis ĉiutage la homan mizeron, la pereon kaj ne havis la forton rifuĝi. Kelka nokto ŝi pasigis sur benko. Dum la tago ŝi almospetis pro iomete da manĝaĵo. Ofte la pordoj ne estis malfermataj. Aliaj estis brufermitaj, kiam ŝi petis iomete da pano. Kompatemaj homoj donis al ŝi teleron da supo; ofte nur sekan panon. Foje okazis, ke oni malafable parolis al ŝi: „neniam tempon ni havas por fremduloj. Nia infano estas malsana“ — „Lasu min eniri! Mi ja estas studinta kiel kuracisto por infanoj. Mi ja povas helpi! Nur iomete por manĝi mi dezirus“. Sed la pordo estis brufermita antaŭ ol Tea Binder povis diri ion. Ŝi ankaŭ ne plu havis kuraĝon diri tion. Kiu estus kredinta al ŝi ke ŝi estis studentino? Eble ŝi jam estis tro malforta paroli ion. Veninte al la trotuaro, ŝi devis apogi sin kaj preskaŭ ne sukcesis iri. Nur malgranda peco da pano estis la manĝaĵo dum la lastaj dudekkvar horoj. Kvazaŭ maljunulino ŝi devis spiregante prokrasti, antaŭ ol ŝi supreniris alian ŝtuparon. Sonorilo sonoretis interne de loĝejo. Virino kun afabla vizaĝo malfermis la pordon. „Ĉu vi havas iomete por manĝi?“ Tea Binder petis timeme. — „Jes, atendu momenton!“ Dankema rigardo sekvis al la virino, kiu ne demandis turmente. — „Ĉu plaĉas al vi tio?“ demandis reveninte la virino. Ŝi montris grandan pecon da pano, sur kiun ŝi metis almenaŭ duonan fundon da kolbaso. Poste ŝi envolvis ĉion. Bonaodoro de kolbaso tendis Tea Binder tuj manĝi. Ŝi povus tuj sin satigi foje per neatendita donaco. Ĝui feliĉon jam longe ne senditan. Sed honto detenis ŝin agi

tiel. Ŝi dankis al la virino kaj forrapidis. Sur trotuaro ŝi staris kaj pensis nur pri la feliĉo povi manĝi. Tie transe estas benkoj. Tie manĝi! Esti feliĉa almenaŭ duonan horon! „Ho kiel delikate odoris la kolbaso!“ Veninte sur ŝoseon ŝi kapturniĝis. Tie jam estas la benko! Ĉi tie sojlo de trotuaro, — sojlo de feliĉo. La

kolbaso odoregis . . . baldaŭ, baldaŭ . . .

Tea Binder ne plu atingis la benkon. En momento, kiam la kolbaso iluziigis novan vivon, pli bonan, ŝi sveniĝis. La korpo, malfortigita pro malsatego, pereis pro troa ĝojo.

Aŭtomobilo mortigis la svenitilon. — Songo de feliĉo finiĝis.

Interesaĵoj pri malnova scienco. De Dro. Heinz Horn.

Neniu eksciigu pri la estonto!

Sciigi ion pri la estonto estis la ĉiama sopiro de la homaro. Plej diversaj aĵoj estis uzitaj sciigi ion per ili pri la estonta sorto de la homaro. Oni esploris la songojn, la birdoflugadon. Oni studis la ludkartojn kaj eĉ sedimenton de kafo oni uzis tiasence. Fine oni konsultis la planetojn.

La homoj baldaŭ rimarkis la influon de la suno al ĉio vivanta, la influon de la luno al tajdo. Konsekvence de tio oni imagis ankaŭ la influon de la planetoj al homa sorto. Tiu imago kaŭzis la astrologian sciencon.

Laŭ malnovaj analoj ĥinaj jam en 2697 antaŭ Kristo oni science observis la stelojn. Ne nur la Ĥinoj sed ankaŭ la Ĥindoj kaj la praloĝantoj de Mezopotamio la Sumeroj uzis la astrologion. Eminentaj astrologo de la tiama tempo estis la „Balo“-pastro Berorus. La astrologio etendiĝis de Egiptujo trans Grekujo al la roma regno. Fame konataj astrologoj estis Firmanus kaj Sulla. Oni diris pri Firmanus, ke li estus antaŭdirinta la pereon de Romo laŭ la konstelacio de la planetoj kaj Sulla antaŭdiris la morton de la imperiestro Caligula. Precipe en la 7a ĝis 13a jarcentoj la araboj uzis la astrologion. Ĝi estris preskaŭ absolute la animojn de la homoj dum la sekvonta tempo. Multaj homoj ne kuraĝis vojaĝi aŭ fari ion gravan, antaŭ ol ili konsultis la planetojn.

La plej eminenta astrologo de la deksepa jarcento estis Nostradamus. Li estis dum sia vivo la favorato de du francaj reĝoj. La reĝoj preferis la konsilojn de sia astrologo. L' angla reĝo Erich XIV murdigis sian diplomaton Sture kaj ties tutan familion. Sture estis blondhara. Astrologo profetis la reĝon, ke blondhara viro detro-

nigos lin. La homaro en la tiama tempo estis tre superstiĉa. Kiam la fama astrologo Stoeffler profetis superakvegion, multaj homoj malŝparis, opiniante la pereon de la mondo estus proksima.

Ankaŭ sciencistoj estis astrologoj. Inter ili la kuracistoj Cardanus kaj Paracelsus, la astronomoj Tycho de Brahe kaj Kepler. La lasta eĉ skribis defendadon por astrologio kontraŭ nekredantaj sciencistoj. Sed baldaŭ oni rimarkis, ke la antaŭdiroj de la astronomio estis pli certaj ol tiuj de la astrologio. La serioza 19a jarcento ne plu uzis la astrologion. Oni preskaŭ forgesis ĝin.

En nuna tempo oni denove okupiĝas pri astrologio. Sed la nunaj astrologoj estas iom singardemaj, kiam ili prognosas. Ili plej volonte nur diagnosas. Kompreneble estas inter ili ankaŭ ĉarlatanoj, kiuj vendas sian „sciencon“ ĉe fojroj kaj en kalendaroj. La fundamento de l' astrologio estas inda, ekzameni severe. Natur-sciencistoj kaj filozofoj kiel Diesch kaj Verweyen atestis tion.

Kiamaniere oni traktas la astrologion praktike?

Por destini la karieron homan, oni starigas horoskopon laŭ horo de la naskiĝo. La elementoj de la astrologio estas la jenaj: La zodiako kun siaj 12 signoj, suno, luno kaj planetoj. Ĉiu planeto, ĉiu zodiako havas difinitan kvaliton. La konstelacio inter la planetoj ĉiam ŝanĝiĝas. Per tio oni opinias, ke ankaŭ la sorto de la homo diferencas. Samtempa naskiĝo eĉ ĉe dunaskitoj ne okazas.

La astrologio estas superstiĉa kaj ankaŭ hodiaŭ oni ne scias ion certan pri ĝi. Oni devas ekzameni la kapablecon de la astrologio, antaŭ ol oni juĝas kaj antaŭ ol ni akceptas.

La ŝtonfosejo.

De Schroenghammer-Heimdal.

Obtuza ekbruo ŝancelas la aeron. Polvo turniĝadas el arbaro. Birdoj flugetumas timeme. Leporo rapidegas tra herbejo, kiu etendiĝas preter rando de arbaro . . . Kio okazis?

Mi iras sur korbeldon kaj rigardas trans arbopintoj malsupren en riverovalon, kiu situas sub mi. Trans la valo sur deklivo, la tero estas disfosita. Ĝuste tie, kie ĝi estas disfosita, staris sekigitaj trunkoj kaj arbustaĵo de mirteloj sur nigra tero de l' arbaro. En disfosita tertruo granitbrilanta, oni vidas ŝajne teruran raŭpon, kiu sin movas fumante kaj spiregante en la sensencan konfusaĵon.

Mi observas longe kaj ekkonas nun, ke la tertruo estas granitrompejo. La vermaro, kiu sin movas sur la muroj estas brunaj viroj. La granda raŭpo estas ŝarĝvagonaro, kiu alportas materialon al la provizejo. La konfusaĵo havas sencon. En ĉi tiu arbarangulo homoj laboras, dum la suno brilas varmege. Ilia volo donas al la ŝtonoj fazonojn. El grandaj granitaj blokoj ili formas kubojn, konusojn kaj konsolojn.

Mi vidas tie malproksime, kiel la ŝtonfosejo pligrandiĝas. La plintoj, kolonoj kaj kuboj estas transportitaj al konstruejoj. Tie formas kaj konstruas diligentaj manoj el ili palacojn kaj dometojn por riĉuloj kaj malriĉuloj. Longaj ŝarĝveturiloj portas la kvadratajn ŝtonojn, en la urbojn.

Mi vidas, kiel kreskas pontokolonoj el la riveroj. Trajnoj tondre veturas trans ili, portas homojn, bestojn kaj fruktojn trans la kvadrataj blokoj, faritaj de la brunaj ŝtonfosistoj. Gotikaj kadetraloj estas konstruitaj per ili. Fundamentoj de magistrataj domoj kaj monumentoj kreskas el la samaj manoj. La ŝtonoj rompitaĵoj el la nigra tero migras en la mondon. Sosejoj estas pavimuitaj per ili kaj trans ĉi tiu granita pavimo infanoj iras en la lernejon, plenkreskuloj iras en la laborejon trans ĝi. La vivo iras trans la ŝtonoj kaj la morto. Reĝoj kaj regatoj iras sur la ŝtonoj elfositaj de la brunaj viroj kaj sub la formitaj ŝtonoj ili ripozas en tompejo. La reĝo de la reĝoj benas la laboron de l' fosistoj en la malproksima ŝtonfosejo.

Tie, kie laboras la fosistoj per marteloj kaj ĉizilo, oni aŭdas la kanton harmonian de la vivo.

Kuriozaĵo.

Forflugis foje la ĉapel' de kap' al mi kaj movis translimen sin, al ia cel' malica vent' ĝin blovis.

Rapide ĵus postkuris mi al ĉapelet' amata;
jen „haltu, kien iras vi?
ĉi tie — limo ŝtata“

Brakgestis iu doganist' kaj „montru la pasporton!“
„Pardonu min, sinjor' limist',
mi havas fian sorton!“

Sed tute ne komprenis ni la vortojn ŝanĝigitajn!
grimacis mi — brakgestis li flataĵojn ne tro spritajn.

Kaj intertempe la ĉapel' daŭrigis sian vojon.
Jen — ĉio pro fibagatel'!
Ĉu nur ĉi tiun fojon?

Tra dua land' jam rulis ĝi kaj eĉ ne restis tie;
pasportojn — dek bezonus mi ho, malhelpaĵoj ĉie!

Bonfartu kara ĉapelet'
en via travojaĝo;
vin ĝenas nek limbarilet'
nek ia homa kaĝo!


(kvintesenco)

Sed iam venos grandepok',
jam signoj fumas flame,
kaj Paneŭropo, bela lok'
superos limojn amē;

Ĉar por la interkomprenad'
ekzistas kunliganto:
„Gepatra lingvo por la ŝtat',
ekstere — ESPERANTO!“

A. Benders.

**Ĉinaj
etuloj
infanstudaĵoj
de Hans Ruef
Hang-tschou**



Senkonsileca interparolo



Donu
al mi la bildon!

Diamantoj produktas elektran fluon.

Interesan fenomenon konstatis Robert Robertson ĉe speciala tipo de diamantoj. Kiam ili estas radiataj per transviola aŭ infraruĝa lumo, ili fordonas elektran fluon. La sciencisto prezentis siajn observojn al la reĝa societo de sciencoj. Fiksate inter du karboelektrodoj, la diamanto tiom longe forsendis elektran fluon, kiom longe la lumo brilis sur ĝin. Ĉi tion oni povis observi per balanco de la montrilo en galvanometro. Pri la ĥemia-fizika naturo de ĉi tiu proceso, precizaĵo ne jam estas konata. Ankaŭ pri la praktika valoro de ĉi tiu observo oni ne jam scias ion.

La aĝo de la terglobo.

De profesoro Dro. W. Anderssen, Berlino.

La terglobo estas aĝa du miliardojn da jaroj. Al tiu ĉi rezulto venis la esplorkomitato de Usono (National Research Council), gvidite de Pro. Dro. Knopf. Antaŭ 50 jaroj oni taksis la aĝon de la terglobo 100 milionojn da jaroj. En tiama tempo oni destinis la aĝon laŭ la salenhavo de la maroj, kiu estis alportita de riveroj en kalkulebla amaso. La nunaj sciencistoj pruvas, ke ĉi tiu supozo estas absolute malcerta. Hodiaŭ ekzistas nur unu certa geologia metodo destini la aĝon de la terglobo. Tio estas la metodo, kiu sin apogas je la ŝanĝo de uranio kaj toriumo al plumbo. Oni scias kiom da tempo estas necesa ĝis ŝanĝiĝis destinita amaso da uranio aŭ toriumo al destinita amaso da plumbo.

Anoj de la nacia esplorkomitato trovis en Sinjaja Pala en Karelio (Rusio), pecon da uraninito, kies aĝo laŭ supre menciita metodo estas 1852 milionojn da jaroj. Laŭ tio la esploristoj deklaris, ke la aĝo de la terglobo estus almenaŭ du miliardojn da jaroj. En ekzakta raporto la fizikisto profesoro Alois F. Kovarik ĉe la Yale-universitato kaj la geologo profesoro Arthur Holmes ĉe la universitato en Durham (Anglio), klarigis sian me-

todon laŭ disfalo de radiumaktiva substanco. La sciencistoj apogas sian aserton sur la fakto, ke laŭ ĝia deveno la plumbo havus diversan atompezon. Profesoro E. W. Brown, instruisto de l' astronomio ĉe la universitato en Yale diras ke ne ekzistas astronomiaj medotoj pri destino de aĝo de la terglobo egale certaj, kiel la medoto destini la aĝon laŭ disfalo de radiumo. Tamen ĉiuj kalkuloj estas kredeblaj.

La plej longdaŭra kaj plej multekosta ŝakludado

okazis inter Amerikano kaj Aŭstraliano kaj daŭris ses jarojn. Ili komunikis lettere la faritajn movojn. La Amerikano estis sendanta siajn leterojn trans Eŭropo, la Aŭstraliano elektis por tio la vojon trans granda oceano. Post kvinjara daŭro la Amerikano deziris rapidigi la ludon per depeŝoj. La ludo daŭris ankoraŭ unu jaron kaj estas perdita de l' Amerikano. Ses mil dolarojn devis pagi la Amerikano kiel sendkostoj por depeŝoj.

Serpento sin operacias.

Oni observis jam kelkfoje, ke bestoj sin mem operaciis. Eĉ korektajn bandaĝojn ili ligis. Kiam bestoj eniĝis en kaptilojn, ili ofte forigis piedojn por liberigi sin. Esploristo de naturaj sciencoj el Chattanooga (Tennessee), antaŭ ne longa tempo observis, kiel serpento sin operaciis. La spino estis rompita. Se oni la beston tenis alten per la mano, pendis la korpo malsupren de la rompita loko. Oni metis la serpenton en kaĝon. Post kelkaj tagoj oni observis ĝin denove. Ĝi estis interplektinta node ĝian korpon tiamaniere, ke la flankoj de la rompita spino tuŝis unu la alian. Tiamaniere okazis resaniĝo.


Bangkok la urbo de la belegaj temploj.

Siamo, la orientazia imperio, kiu situas inter Ĉinio kaj Hindujo, konservis bone sian antikan kulturon. La loĝantaro

estas fervoraj anoj de la budha religio, al kiu donis jam ĉiam la siamanoj altan gravecon. Tio influis nature la tutan kulturon kaj belarton. La templokonstruaĵoj, kiuj estas mirindaĵoj de konstruarto, plastiko kaj pentrarto, argumentas tion. La ĉefurbo Bangkok mirigas per grandiozeco de tiuspecaj konstruaĵoj, ĝi superas ĉiujn aliajn urbojn de la malproksima oriento. Belaj kaj vastaj placoj, belegaj statuoj budhaj, imponantaj monumentoj estas atestantoj de genia kulturo siama.

Malfeliĉa rekordulo.

La rivero Tajo estas konata kiel tre danĝera akvovojo. Oni ofte provis tranaĝi la distancon inter Toledo kaj Lisboa; sen sukceso. Antaŭ ne longe sukcesis al du junaj Hispanoj traveturi la distancon inter Toledo kaj Lisboa, per malgranda kanoto. Angla kolonelo ankaŭ intencis naĝi en Tajo. Li sciis la danĝerojn kaj volis eviti ilin per ruza maniero. Li fabrikigis sin kostumon el gumo, kiu estis ŝveligita per aero. La piedoj estis vestitaj per ŝuoj, kiuj havis plandojn el plumbo. Tiamaniere li naĝis vertikale en la rivero. Sen akcidento li transpasis la torentojn sur hispana regiono. Sed post forlaso de l' hispana limo atingis lin la sorto. Ĉasanta portugalo rimarkis lin. Tiu opiniis la kolonelo estus riveromonstro kaj mortpafis lin. La vestaĵo sen aero ne plu tenis lin superakve kaj la tre pezaj ŝuoj subakvigis la mortiton. Neniam oni trovis la kadavron.



La templo Wat Cheng en Bangkok.

La malgranda kalkulartisto.

Sinjoro buĉisto estis aĉetanta de sinjoro gastigisto du grasajn porkojn kaj metis por ili sur la tablön notindan sumon da bankbiletoj. La edzino de la gastigisto alportis botelon da vino. Dume la du viroj tostante ektuŝis la glasojn envenis la plej juna filo de la gastigisto. Li estas naŭjara vigla bubo.

„Salutu Dion, Guĉjo“ diris bonhumore sinjoro buĉisto, „en kia klaso vi nun fakte estas?“

„En la tria“, respondis la bubeto.

„Ĉu efektive, tiam vi certe povas kalkuli bone?, mi esperas tion!

„Nun ni provos, ĉu vi pravas“, diris la buĉisto kaj ridetis aprobe. Li prenis el sia monujo kvinmarkan moneron novan.

„Kiam vi estas kapabla disdoni la moneron inter vi tri fratoj tiamaniere, ke ĉiu el vi ricevos precize la saman, tiam vi estos gajninta ĝin. Sed ĝuste precize la saman sumon, alie ne valoras.“

La knabo meditis momenton. Poste li diris vigle: „Tion mi povas fari, sed antaŭe la monero devas esti ŝanĝita al moneretoj“. „Bone, ŝanĝu ĝin“, diris sinjoro buĉisto kaj donis ĝin al li.

Guĉjo iris al la patrino kaj petis de ŝi monerojn: tri po unu marko, tri po duona marko, tri po dek pfenigoj kaj kvar po kvin pfenigoj. Nun li dispartigis sur la tablo tri samajn amasetojn kaj retenis ankoraŭ moneron valorante kvin pfenigojn.

La buĉisto ridis, sed Guĉjo ne estis senkonsila.

„Patrinjo, donu al mi da pano por kvin pfenigoj“, li diris. La patrino detranĉis al li pecon, ne pli granda kaj ne pli malgranda, ol ŝi estas kutimata doni al gastoj por sama monero kaj prenis por tio la monon. Guĉjo metis la panon sur tablon kaj distranĉis ĝin je tri same grandaj pecoj, laŭ maniero de kukotranĉado. Tiam li metis al ĉiu amaseto tian pecon da pano kaj rigardis triumfante la buĉiston.

Sinjoro buĉisto ridegis tutkore, frapis Guĉjon sur la ŝultron dirante al la feliĉa patro: „Gastigisto, kiam vi estos maljuna, vi trankvile povos transdoni vian negocon al via filo, li certe trovos la ĝustan vojon.“

Cirkuligu la novaĵon!

ekzistas revuo bela kaj interesa. La abonprezo: nur 0.40 germ. markoj, kvaronjare.

Duelo en Flappers. Skizo de Dietrich Rasmussen.

Neniam ekde ekzistis Rocki Mountains okazis tia ekscito en la vilaĝo Flappers. Sur la sola kaj ĉefa strato staris la enloĝantaro kaj diskutis pri sensacia novaĵo.

Duelo okazos kaj kia!

Ambaŭ kontraŭuloj vekigis plej altan intereson. Gus Killer estis konata ĉie, kiel plej kuraĝa bandito. Li estas la plej certa pafanto de l' ĉirkaŭaĵo kaj plenumis almenaŭ dekdu mortigojn kaj rabatakojn. Malgraŭ tio li estis la plej eleganta viro en Flappers. Ĉiam oni vidis lin vestite per flava rajdpantalono kaj altaj botoj. Sur la kapo li portis grandan molan ĉapelon. Ĉiumatene li visitis la frizejon O' Flanagan. Tie oni beligis lin per ĉiaj friziloj.

De tiu homo forlogis Patrick Mulcahy la fianĉinon kaj edzinigis ŝin intertempe de 24 horoj. La tuta enloĝantaro miriĝis, ke Gus ne finigis la aferon per kuglo. Sed li bone sciis sian superecon per ĉiaspecaj bataliloj. Pro tio li postulis de Mulcahy, ke ili duelu. La dika pordisto bonanima akceptis tuj. Kiel bataliloj li elektis or-

dinarajn pafilojn. La duelo devos okazi en mallumigita kinematografejo. Tiu aranĝo ŝajnas esti certega memmortigo. Mulcahy fakte ne sciis uzi pli bone la pafilon ol ĉiu alia homo en Arizono. Gus Killer certe ne maltrafos la celon, kiam siaj okuloj estos kutimitaj la malhelon. La enloĝantaro estis konvinkata pri tio.

La fatala tago komencis.

Je la deka la duelo okazos. Unu horo antaŭe kunvenis la homaro antaŭ la kinematografejo. Ĉiu interesis pri la rezulto de la duelo. Kiel unua alvenis Mulcahy. Li salutis per larĝa rideto siajn amikojn kaj konatojn. Ili funebris lin jam kiel mortonton. Poste ankaŭ Gus Killer venis el la frizejo. O' Flanagan la frizisto razis lin propramane, lavis al li la kapon kaj dislimis akurate la harojn. Mulcahy kaj Gus Killer anoncis sin ĉe la urbestro, kiu estis la senpartiulo.

„Aŭskultu la kondiĉojn de la duelo“ diris Ben Porter la urbestro. „La kontraŭuloj devas demeti siajn ŝuojn kaj ĉapelojn. De mi ili ricevos la dutubajn

pafilojn kaj po persono du kuglojn. Tra diversaj pordoj ili devas iri en la arenon, poste la pordoj estos fermataj. Post pafado, kiu funkcias kiel signalo, la duelo komencos. La venkonto anoncos per tri frapoj, ke li volas eliri. Peko kontraŭ ĉi tiuj simplaj kondiĉoj mi punos per tuja pendigo“.

Killer kaj Mulcahy iris en la arenon, kies pordoj estis fermataj malantaŭ ili. La ekscitego estis ĝenerala. Porter prenis revolveron kaj pafis en la aeron. La ekscitego de la amaso pligrandiĝis kaj finis per komuna ekkriego, kiam oni aŭdis pafon.

Kiu estis la pafanto?

Ĉiuj atendis kun plej granda emocio tri frapojn. Ili ĵus estis aŭdataj. Oni ku-

ris al la pordo. Kiu elvenos?, Nature Killer, kiu certe mortpafis sendemande la bedaŭrindan pordiston. La pordo malfermiĝis, kaj elvenis Mulcahy, kiun ĉiuj rigardis kiel mortiton. Oni kuris en la kinematografon. En angulo kuŝis la terura bandito mortigita per bone celita kuglo. La ĉeestantoj ovaciis senfine. Mulcahy forigis sin de ili kaj iris al sia amiko kaj samlandano O' Flanagan. Ambaŭ festis la venkon per botelo da brando en sekreta ĉambreto.

„He Pat, ĉu vi ne estis iomete malkuraĝa dum ĉi tiu stranga afero?“ „Tute ne, kara amiko! La fosforaĵo per kiu vi lavis lian kapon, lumigis ĝin kvazaŭ plenluno. Pli bonan celon mi ne estus havinta“.

Ejner intencas aĉeti aŭtomobilon.

Gaja anekdoto de Hans Auer.

Ejner heredis monon. Li nun sidas en kafejo kaj pripensas kion fari. Mi aĉetos aŭtomobilon! Subite li scias.

„Bonan tagon, sinjoro Ejner!“

Sinjoro Korn la agento de aŭtomobilfirmo venis al li. „Kiam vi intencas aĉeti aŭtomobilon, tiam prenu nur sescilintan“.

Ejner estis surprizata. „Kiel vi scias tion? Sinjoro Korn ridetis. „Vi legis gazeton, kiu anoncas aŭtomobilojn. Mi ankoraŭ sciigis, ke vi heredis monon. Krom tio vi ofte entuziasmiĝis pri aŭtomobilo. — Aĉetu de mi. Vi ricevos ĝin tute malkare. — Ejner notis la adreson.

Intertempe sinjoro, kiu sidis apud Ejner iras al la telefono. „He Ferdinando! Ĵus mi aŭdis, ke sinjoro intencas aĉeti aŭtomobilon. Ĉu vi venos ĉi tien? Mi atendas vin! Ejner foliumis en la gazeto. La sinjoro, kiu telefonis alparolis lin.

„Mi rekomendas al vi veturilon, kiu staras ĉe mia bofrato.“ Li klarigis la avantaĝojn de ĝi. „Vi pagos per partopagoj.“ Ejner notis la duan adreson.

Rapide venis sinjoro en la kafejon. Per du paŝoj li estis ĉe Ejner.

„La veturilo ankoraŭ estas ricevebla.“ „Ĉu sinjoro Korn venigis vin? „Ĉu Korn? Kiu Korn? Ne, sed vi do intencas aĉeti aŭtomobilon! Jes, sed — — Atentu sinjoro. — kaj li babilis pri avantaĝoj de ia aŭtomobilo. Ejner notis. La sinjoro, kiu donis la duan adreson, ĉagrenite foriris.

„Bonan tagon, sinjoro Ejner.“

Aŭtomobilvendisto frapis afable la ŝultrojn de Ejner. „Vi kompreneble aĉetos „Pingveturilon!“ „Pingveturilo“, notis Ejner. „Ĉu „Pingveturilo“? Sinjoro, kiu ĵus preteriris, sarkasme ridetis. „Hodiaŭ oni nur aĉetas „Pong“-veturilon.“

Ejner notis „Ping-Pong“. La ŝvito flu- etis de sur la frunto. — Alvenis la kelnero. „Mi scias bonan aŭtomobilon por vi. Ĝi apartenas al direktoro L. La veturilo estas havebla absolute malkare.“ Ejner pagis kaj forkuris. Dum la nokto li dormis tre malbone. Je la sesa matene li vekigis. — Sonoris. Sinjoro, eleganta vestita, staris antaŭ li.

„Tutmondo esperanta“ aperas regule en la mezo de la monato.

„Mi petas subskribu“

„Kion?“ — „Kontrakton de asekuranco. Kiam vi posedas aŭtomobilon, vi devas esti asekurata.“

Ejner forpelis lin. — Li vestis sin kaj intencis foriri. Intertempe venis ankoraŭ kelkaj agentoj de ĉiaspecaj fabrikejoj kaj sinjoro, kiu diris: „Estus iom saĝa, se vi aĉetus bienon anstataŭ aŭtomobilon.“

Posttagmeze venis Ejner en la kafejon. La kelnero atendis lin. „Ses sinjoroj atendas vin pro vendado de aŭtomobiloj. „Vi konas min, sinjoro“, aĉetu nur la veturilon de la direktoro L. Ejner hejmeniris kaj intencis aĉeti la veturilon, kiun rekomendis la kelnero.

Antaŭ lia loĝejo atendis simpla homo. Tiu diris: „Sinjoro Ejner, ĉu vi intencas aĉeti la veturilon de direktoro L.? „Pri pensu bone! La afero havas „ĉevalpiedon“. Li donis al Ejner adreson, kie estas ri-

ĉevebla aŭtomobilo, plej malkarâ.

La alia tago komencis. Ejner forlasis sian loĝejon je la kvina matene. Posttagmeze li venis gaje en la kafejon. Sen parolado li trapaŝis la vicojn de dekdu sinjoroj. Tiam li diris: „Sinjoroj, mi jam aĉetis!“

„Ĉu vi aĉetis?“ diris la sinjoroj. Ejner restis trankvile.

„Jes mi aĉetis, sed ne aŭtomobilon. Mi aĉetis ĉevalon! Ĝi estas pli nobla ol aŭtomobilo kaj mi jam antaŭe estis konvinkita, ke la afero havas „ĉevalpiedon“.

Ĉu vi jam varbis abonantojn?

Se ankoraŭ ne, faru tion!

Vi per tio helpos pligrandigi la amplekson de la revuo.

Interrompita entombigo.

En kelkaj ŝtatoj eŭropaj oni konas la kutimon, salutpafi ĉe entombigo de iama militisto. Ĉe tiaj agoj ofte okazas strangaj epizodoj.

En ĉeka urbo oni entombigis ĉefpafiston de pafista klubo. La anoj intencis salutpafi, sed la urbestro ne permesis la uzadon de pafiloj. La pafista klubo nun uzis malgrandan bombardilon. — Ĉio estis bona.

Ĉe la unua pafo la „artileriano“ estis forgesinta forpreni la kovrilon de la tubo. La leda kovrilo flugis kun tondra bruado super la kapojn de la ĉeestantoj kaj detruis parton de la tombeja muro. La ekscito estis ega. Kiam la dua pafo sukcesis bone, oni rekunvenis ĉe la tombo. Unu el ili estis tiom ekscitita, ke li metis sian ombrelon en la tubon de la bombardilo. Li ŝajne opiniis, ke la tria pafo estus preter. En la sama momento ekkrakis la tria pafo kaj super la ĉeestantoj ŝvebis misteria aĵo nigra. Kvazaŭ frenezuloj saltis la funbrantoj ĉiufanken. Tutan horon poste la anoj de la pafista klubo rekunvenis en la tombejo.

Reciproke oni memoris pri la festeno je la sama vespero. Tie oni memoris ĉe bona trinkaĵo pri la stranga entombigo.

Dispartigebla.

La amerika generalo Nikols perdis kruron, brakon kaj unu okulon dum la milito 1861-1864. Tamen li estis ŝercemulo. Nikols nun portis artefaritajn membrojn.

Iamfoje li tranoktis en hotelo en Boston. La servanta negro devis helpi al li demeti la vestaĵojn. „Nu Sam, forprenu de mi mian kruron“. Diris la generalo. La negro rigardis mirege.

„Ĉu vi ne scias, kiel oni faras tion?“ „Atentu!“ Jen kuŝis la kruro sur la tablo. „Nun forprenu al mi la brakon“, kuraĝigis li la negron.

„Ho sinjoro“, ĝemis la negro, „tion mi neniam faris“. „Malsaĝulo, nenio estas pli facile ol fari tion!“ Li metis la brakon sur la tablon apud la kruro. „Nun ankaŭ estus bone, kiam mi demetis mian okulon“. Diris la generalo. Tremante pro timo la negro retiris sin al la pordo. „Atentu ankoraŭ momenton“ diris Nikols kaj enlitigis sin. „Nun forprenu al mi ankaŭ la kapon“. La negro forsaltis.

Donu al viro virinon; kaj al virino spegulon, ambaŭ sin ne plu enuos

Krucvort-enigmo.

Horizontale:

1. Manlabora profesio. 6. Prepozicio, signifas mankon. 8. rodulo. 10. Prepozicio montranta. 11. Verbo, signifas moviĝi. 12. Adjektivo montranta. 13. Resenda pronomo. 14. Bonodora floreto, (ap.) 15. Pronomo posesiva. 16. Adjektivo, signifas ne mola.

Vertikale:

2. Verbo, uzate por kunmeti la tempojn. 3. Trink-aĵo. 4. Sufikso. 5. Membrano en okulglobo. 7. Adjektivo, signifas efektivon. 9. Melodio, (ap.) 10. Supernatura estaĵo. 12. Adverbo tempa. 14. Sekso, (ap.). 15. Pronomo.

■	1	2	3	4		■
5	■	6			■	7
8	9			■	10	
11			■	12		
13		■	14			
	■	15			■	
■	16					■

Ŝarado.

a — ak — ar — bi — ĉag — ci — cik — da — dent' — fan' — gom' — gon'
 in — in — jas — le — le — li — li — li — lin' — mad' — mat' — me'
 men' — mi — na — nas — no — no — ok — op' — put' — re — re — ro
 sta — ti — to — tob — tu — ul — ur — va — va — va — vu' — ze

La suprajn silabojn oni kunmetu tiel, ke fariĝas 19 vortoj, laŭ malsupraj signifoj. La komencliteroj legite de supre malsupren kaj la finlitteroj de malsupre supren donas laŭtempan demandon.

1. Esti malĝoja. 2. Postuli difinitivajn kondiĉojn (ap.) 3. Minerala graso (ap.). 4. Eco de homo, kiu ne plu kapablas labori. 5. Arbetu kun bonodoraj floroj (ap.). 6. Militistaro ap. 7. Nenormala vidkapablo (ap.). 8. Naĝbirdo. (ap.). 9. Simpla veturmaniero. 10. Monato. 11. Ano de popolo, kiu konstante migras (ap.). 12. ldo. 13. Fundamenta regularo. 14. Ĝardena vegetaĵo. ap. 15. Malfeliĉa okazo. 16. Perioda presaĵo (ap.). 17. Malgrandega homo (ap.). 18. Veturilo surrela (ap.). 19. Granda vazo.

Magia kvadrato.

La literojn:

A A B D D D I
 K K O O O R
 R R R

oni metu tiel en la apudan kvadraton, ke vertikale kaj horizontale rezultas samaj vortoj.

1. Fabela besto (ap.). 2. Montri gajecon (substantiva). 3. Honoregi kiel dion (ap.). 4. Portebla ujo (ap.).

Rido sanigas !!!

Lernejo.

Bubeto devis forresti de la lernejo kelkajn semajnojn pro malsano. Kiam li ree venis en la lernejon, la instruisto demandis lin: „Kiam vi estis la lastan fojon ĉi tie“?

La bubeto diris: „Kiam ni ekzekutis Ludovikon XVI de Francio“.

„Al kiu vortkategorio apartenas la vorto „pantalono“? „Pantalono“ apartenas al substantivoj, sinjor' instruisto. Sed ĝi estas neregula. Supre ĝi estas singularo, kaj malsupre ĝi estas pluralo.“

Vera okazintaĵo.

Okazis dum okupado de la rejnlando en iu rejnlanda urbo. La urbparto dekstre ĉe la rejnbordo estis sen okupado, nur la ponto, kiu kondukas al la maldekstra parto estas gardita de francaj soldatoj! Estis malpermesata transpaŝi la ponton; nur personoj, kiuj plenumis gravegajn funkciojn, (ekzemple kuracistoj kaj akuŝistinoj), havis permeson transpaŝi ĝin.

La francaj soldatoj estis instruitaj alvoki al la transpaŝontoj la germanlingvan demandon: Arzt oder Hebamme? (Ĉu kuracisto aŭ akuŝistino?)

Estis meznokto. — Viro proksimiĝas al ponto. La franca gardisto alvokas: „Arzt oder Hebamme?“ Tuj respondis la viro bonhumora kun serioza mieno: „Hebamme!“ „Pasu!“ ordonis poste la gardisto kun seriozega mieno.

Radio.

„Pluvegas! malgraŭ la radio hieraŭ antaŭdiris belan veteron“.

„Vidu mi diris ĉiam, ke nia aparato ne bone funkcias“

Fanfaronulo.

Mi konis sinjoron, tiu estis kababla imiti kokokrion tiel simile, ke la suno leviĝis.!!!??

Lia vojo.

Sinjur' instruisto ordonas, ke la lernantoj skribu pri la temo: „La vojo al la lernejo“.

Je alia tago ĉiuj krom unu skribis la taskon. „Kial vi ne skribis la taskon?“ Demandis la instruisto. „Ĉar mi estas la filo de la lernejmastro!“

Tro multe postulita.

Okaze de sia naskiĝtago Kurto ricevis donace de l' onklino belan libron. Pasis tempo. Kurto vizitas la onklinon.

„Nu! Kurto, kiel plaĉas al vi la donacita libro?“

„Mi ankoraŭ ne estas rigardinta ĝin“.

Kial ne?

„Ĉar patrinjo ordonis: „Antaŭ ol mi estas tuŝonta ĝin, mi lavu miajn manojn!“

Demando.

Emilo demandis sian amikon Petro: „Ĉu vi scias, kiom aĝa mi estas?“

„Vi estas precize kvardek ok jarojn aĝa!“ Respondis Petro.

„Vi pravis, Emilo! De kiu vi sciigis tion, tiom precize?“

„Nu apud mia hejmo loĝas duonidioto, tiu estas dudek kvar jarojn aĝa!“

Korespondado kaj interŝanĝo.

Por aperi ĝustatempe, Anoncetoj devas eniri plej malfrue je la komenco de la monato. La adreson oni skribu precize, laŭeble preslitere.

Mallongigoj: s-ro — sinjoro; s-ino — sinjorino; f-ino — fraŭlino; k-do — kamarado; dez. — deziras; koresp. — korespondi; interŝ. — interŝanĝi; L — letero; k.ĉ.l. — kun ĉiuj landoj; p.ĉ.t. — pri ĉiuj temoj; PK — poŝtkarto; PI — poŝtkarto ilustrita; PM — poŝtmarko; bfl. — poŝtmarko bildflanke;

s-ro Gerrit Vos, Molenaarstr. 186 Haago Holando dez. koresp. k.ĉ.l., p.ĉ.t., PM bfl., resp. garantiata.

Grupo de laboristaj Esperantistoj dez. koresp., inv. k. grupe k.ĉ.l. p.ĉ.t.. Skribu multnombre al k-do P. Schwartz, Laakhof Den Haag-Nederlando.

Gesperantistoj atentu!

La Karlsruhe SEA-grupo aranĝos meze de februaro letervesperon por konvinki la novajn gelernantojn de la vintra kurso pri utilo kaj neceso de Esperanto. Bonvolu sendi PK, PI kaj L al k-do Robert Hlavač Rheinstr. 19 Karlsruhe i. B. Germanio. Respondo nepre garantiata.

s-ro Theodor Kneller ĉe familio Alois Rössler, Rua do Bom Jesus 237 Recife Brazilio, dez. koresp. k.ĉ.l. PK, PI, bfl.

s-ro Karl Henkenhaf, Zeppelinstr. 27 (Albsiedlung) Karlsruhe, i. B. Germanio, dez. koresp. k, ĉ.l. p.ĉ.t. PK kaj L, resp. garantiata.

k-do Willi Hanselmann, Forchheimerstr. 23 Karlsruhe, i. B., Germanio, dez. koresp. k.ĉ.l., p.ĉ.t. resp. g.

s-ro André Bertin 12 Avenue des Mouleireaux á Billancourt Seine, Francujo, dez. koresp. PK kaj L p.ĉ.t., speciale el Ameriko, Aŭstralio kaj Azio.

Proletoj sportorganizaj, interligiĝu kun sovetaj sportkolektivoj. Informu kiel vi preparas vin por la Ruĝa Spartakiado. Esperanto-peranto por la laborista Spartakiado en Moskvo 1933 estas PEK-filio Moskvo, adreso: Moskvo I, Spiridonovka, 15 CK SEU PEK.

Sciigoj de la eldonejo.

Listo de la landoj, en kiuj oni povas mendi la revuon ĉe la poŝto: Aŭstrio, Belgando, Britujo Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Danzig, Estonio, Finnlando, Francujo, Germanlando, Hungarlando, Italujo, Latvolando, Litovujo, Nederlando, Norvegujo, Rumanujo, Svedlando, Svislando, Usono. Ĉiuj ceteraj landoj mendu rekte ĉe la eldonejo. Por senkostoj oni kalkulu 20% al la abonprezo.

Se vi volus aĉeti solan numeron de la revuo, vi povas fari tion. Unu sola gazeto kostas 0.15 germ. mark. sen afranko. Kursgvidantoj aŭ grupoj, kiuj intencas mendi multnombre, ricevas rabaton. Prezo ĉe mendado de 10 ekzempleroj po 1 peco 0.12 germ. mark.

Druck und Verlag (Presejo kaj Eldonejo): Friedrich Schloe, Tutmondo-Druck und Verlag, Karlsruhe a. Rh. Dammerstockstr. 15. Verantwortlich für den Inhalt (Respondeca Redaktoro): Fritz Müller, Karlsruhe a. Rh., Goethestrasse 2, Germanlando.



Tutmondo-Eldonejo
FRIEDRICH SCHLOE
Karlsruhe a. Rh.

Dammerstockstr. Nro. 15
Germanlando

Karlsruhe, en decembro 1933

Tre estimataj grupestroj kaj kursgvidantoj!

Ĉi kune ni prezentas al vi nian ĵus eliritan revuon: „TUTMONDO ESPERANTA“ kun peto atenti la jenan: La revuo taŭgas precipe kiel legaĵo por komencintoj, kiuj perfektigu sin en la lingvo. Tion ili povas fari per facila legaĵo, kiun ili trovos en nia revuo. Ni nun petas vin montru ĝin al viaj gemembroj kaj kursvizitantoj, por ke ili povu aboni ĝin. Atentigu ilin, konsideri la malaltan prezon, kiu ebligas aboni la revuon ankaŭ al tiu Esperantisto, kiu havas tre malmultajn enspezojn.

Via penado ne estos sengajna, ĉar ni garantios al vi senpagan abonon de nia revuo, laŭ via varbsukceso. Se vi sukcesos varbi dek du abonantojn, la abono estas senpaga por vi dum unu jaro. Se vi sukcesos varbi ses abonantojn, ĝi estos senpage liverota por vi dum duona jaro. Kaj fine, per varbado de tri abonantoj, la revuo estos senpage liverota por vi dum tri monatoj.

Konsiderante la malaltan prezon kaj la sufiĝegon de la enhavo vi certe ne malsukcesos varbi. Uzu la ĉi kulan formularon laŭ surprisita deklaro kaj ĝin resendu plenigite al ni. Ni jam antaŭe esprimas nian plej sinceran dankon pro via penado kaj salutas altestime

TUTMONDO ELDONEJO.